

## **Deklaro de Liverpool 2017**

### **MONDA MOVADO, KOMUNA VIZIO**

La mondon alfrontas zorgigaj kaj danĝeraj tendencoj. Multaj agantoj organizadas kontraŭbatali la defiojn ĉi tiuj tendencoj prezentas. La Monda Verdularo, agentoj de ŝanĝo, antaŭenigante daŭripovan, justan, pacan kaj demokratian estontecon por la homa civilizacio sur la Tero, aliĝis al nenombreblaj bataloj por atingi niajn komunajn valorojn. Ni promesas kunlabori estonte eĉ pli forte fari la fundamentajn transformojn kiu necesas por redoni al estontaj generacioj la mondon kian ni kvazaŭ pruntis de ili.

Ekologiaj krizoj, malegaleco kaj konfliktoj kreskas, instigante alvokojn por politika kaj socia ŝanĝo. Senskrupulaj absolutismaj gvidantoj kaj dekstrismaj politikistoj estas ekspluatantaj ĉi tiun malkontentecon. Uzante popolismajn rimedojn, ili kulpigas pri preskaŭ ĉiuj problemoj la malplimultulojn, malkonsentulojn, la aliajn, precipe migrintojn kaj azilopetantojn. Por veraj problemoj, kiel la klimatsanĝiĝo aŭ rigoraj elspezreduktoj kaj socia divido, gvidantoj kiel la prezidentoj Putin, Trump, Erdogan, Duterte kaj aliaj proponas fikciajn solvojn. Ni Verduloj male - ni provas anstataŭigi timon per espero, malamon per kompatado, rasismon per respekto por ĉiuj.

Ni Verduloj proponas politikon kia estas kaj praktika kaj vizia. Ni kredas je socio kiu respektas diversecon, promocias interpacigon, kreas veran demokration, defias malegalecon kaj, antaŭ ĉio, respektas kaj naturon kaj estontajn generaciojn. Ĉi tiuj Verdaj valoroj detale verkitaj en nia Ĉarto, estas komunaj al Verdaj Partioj tutmonde. Dum ni respektas la diversecon de Verdaj Partioj, ni sin-tenas kaj al komunaj principoj kaj al praktikebla maniero agadigi ilin.

#### **LA KLIMATO-ŜANĜIĜO**

La klimatsanĝiĝo estas la plej granda minaco kiu defias nin, minaco por la homoj, por la homa socio, por la medio kaj por la estonteco. Ni Verduloj promesas agi rapide kontraŭ la klimatsanĝiĝo por plenumi la celon de la Interkonsento de Parizo kiu limigas plivarmiĝon je maksimume 1,5 gradoj super la antaŭ-industriaj niveloj.

#### **La pura elektro por ĉiuj**

Suno, vento kaj aliaj renovipovaj fontoj povas doni energion al la planedo. Verduloj klopodas ebligi al ĉiu aliron al pura elektro eliminante atomenergion kaj malakceptante novajn grandskalajn akvobaraĵojn kaj industri-nivelan biomasan energion.

#### **Lasi fosiliajn brulaĵojn en la tero**

Ni Verduloj kampanjas fini subvenciojn por fosiliaj fueloj en G20-landoj ĝis 2020, kaj por malinvesto je fosiliaj brulaĵoj flanke de registaroj kaj publikaj instancoj je ĉiuj niveloj. Verduloj oponas hidraŭlikan fendadon, novajn aŭ plivastigatajn karbominejojn, kaj submaran nafto- kaj gaso-boradon.

#### **Protekti la arbarojn**

Naturaj arbaroj kaj aliaj naturaj pejzaĝoj mildigas la klimato-ŝanĝigon. Verduloj protektos ilin.

#### **Kompensi perdon kaj difekton**

Ni Verduloj promesas helpi senŝirmajn, vundeblajn landojn atingi rimedojn enkadre de internacia juro pri perdo kaj difekto kiujn kaŭzis la klimatsanĝiĝo.

## **EKOLOGIO**

Tero-sistemoj de kiuj la tuta vivo dependas estas detruataj, poluataj aŭ degenerataj je senprecedencaj gradoj. Sen urĝa transformiga ŝanĝo por limigi homan agadon al tutmonda daŭripovo eble sekvos katastrofaj konsekvencoj. Verduloj elstaras gvidi kolektivajn agadon cele al ekologia daŭripovo kaj resilienco (elasteco) de loka ĝis tutmonda niveloj.

#### **Protekti kaj restarigi naturon**

Ni Verduloj promesas protekti kaj restarigi biodiversecon kaj endanĝerigataj ekologiaj sistemoj, inter ili arbaroj, oceanoj, glacikovraĵoj kaj montaraj glaĉeroj.

#### **Transformi esencajn homajn subteno-sistemojn**

Ni Verduloj antaŭenigas ekologian ekonomion kaj novajn regado-manierojn kiuj subtenas daŭripovajn sistemojn pri nutraĵoj, akvo-resursoj kaj urboj. Verduloj promesas agi al ekologia daŭripovo. Verduloj defendas la Bestajn Rajtojn, antaŭenigante kompaton por aliaj specioj kaj defiante fabrikuman agrikulturon kaj bruto-tenadon k aliajn formojn de krueleco.

#### **DEMOKRATIO**

Ni ne sukcesos pritrakti klimatajn, ekologiajn kaj sociajn temojn sen forta demokratio. Ni kredas ke partoprena demokratio permesas la civitanojn evoluigi efikajn solvojn al la problemoj kiujn ni alfrontas.

#### **Ebligi reprezentadon**

Ni Verduloj promesas forigi obstaklojn al politika reprezentado ekzemple altaj kotizo-postuloj por kandidatiĝo kaj reguloj malebligantaj registradon de partioj, kaj ni agadas por la proporcia balotsistemo. Ni kondamnas kontraŭdemokratiajn praktikojn ekzemple regulon por unu-partia regado kaj dumviva prezidenteco. Verduloj laŭeble partoprenos je elekto-observantaj misioj.

#### **Povigas virinojn partopreni plene en la politika vivo**

Ni Verduloj kunlaboros por forigi obstaklojn kontraŭ virina partopreno en la politiko kaj antaŭenigos kaj subtenos egalecan partoprenon de virinoj en ĉiuj aspektoj de la politika vivo. Ni subtenos kaj plifortigos la laboron de la Virina Reto de Monda Verdularo.

#### **Instigi gejunulojn engaĝiĝi politike**

Ni Verduloj aktive instigos junularan partoprenon en ĉiuj flankoj de la politika vivo. Ni kunlaboros kun La Monda Juna Verdularo povigi gejunulojn enkadre de la partoprena demokratio.

#### **Promesas agi por la Verda Protekto**

La Verda Protekto lanĉita en 2001 mobilizis Verdulajn parlamentanojn kaj aktivulojn helpi defendi minacitajn Verdulojn. Tio estas mekanismo por premi registarojn kie homoj estas malliberigataj, torturigataj, senigataj je iliaj rajtoj, aŭ vivas sub ekstrema minaco.

#### **Publikan politikon difinu registaroj, sed ne kompanioj**

Ni Verduloj laboros reakiri la publikan spacon kaj potencon, kaj fini la kompanian influon al la demokratio. Ni forigos la kondiĉojn el komercaj akordoj kiuj rajtigas fremdajn firmaojn iniciati proceson kontraŭ landoj en sekremaj tribunaloj

ekster normalaj leĝaj kadroj (Investanto-Ŝtata Disputo-Decidado).

Ni Verduloj promesas kunlabori kontraŭ ekspluato kaj ekologia difektoj kiun kaŭzis transnaciaj kaj eksterlandanaj kompanioj kiel Kanadaj minej-kompanioj en Latinameriko kaj Shell en Niĝerio; precipe montros iliajn aktivecojn kaj efikojn al la parlamento de la kompania hejmlando.

### **Defendi la civilan socion**

Ni Verduloj subtenas memdeterminadon de ĉiu individuo kaj por ĉiuj civitanaj grupoj kaj por socia organiziĝo. Ni bonvenigas ĉiun antaŭeniron cele al pli da spaco por la civila socio kaj ĝiaj organizaĵoj kaj kontraŭas al ĉia leĝorompo de absolutismaj reĝimoj aŭ tendencoj.

### **Defendi la liberecon por amaskomunikiloj**

Ni Verduloj antaŭenigas respekton al amaskomunikilaj liberecoj kaj ĉiuj civitanaj liberecoj. Ni malakceptas kontraŭleĝan enkarcerigon de ĵurnalistoj kaj subpremon de sendependaj amaskomunikiloj.

### **SOCIALA JUSTECO**

Ni Verduloj rekomendas pli egalecan socion. Malegaleco damaĝas al ĉiuj; akraj malegalecoj en enspezo kaj riĉeco kreas malriĉecon kaj kaŭzas socian korupton. Dum tutmondiĝo kreis mirindajn okazojn favore al socia progreso kaj novaj eblecoj, la negativa flanko inkluzivis grandegan kreskon de la riĉeco kaj potenco de eta malplimulto. Inkluzivo kaj egaleco estas kerna plibonigante vivkvaliton por ĉiuj.

### **Sekso kaj seksa identeco**

Ni Verduloj antaŭenigas liberigon kaj diversecon. Ni malakceptas socion kie virinoj ne estas plene egalaj kaj ni argumentas ke la povigo de virinoj estas antaŭkondiĉo por kernaj verdulaj valoroj. Ni agnoskas ke sekso ne estas binara kaj seksaj identecoj estas diversaj. Verduloj delonge antaŭenigis egalrajtecon por gejaj, lesbaj, ambaŭseksemaj, transseksaj, kaj interseksaj komunumoj.

### **Migrado kaj rifuĝo**

Ni Verduloj defendas la rajton ricevi rifuĝejon kaj probatalas rajtojn de migruloj. Ni malakceptas politikon de "propeka-kapriĝo" de ili. Klimatoŝanĝiĝo, tutmonda malegaleco, militoj kaj politikaj konfliktoj rapidigas kreskon da rifuĝulaj nombroj. Ĉiuj registaroj, precipe en la plej riĉaj landoj, devas pritrakti la kaŭzojn de truditaj movadoj de loĝantaroj kaj helpi provizi rebonigon.

### **Imposto-justeco**

Ni Verduloj promesas batali kontraŭ imposta fraŭdo je nacia, regiona kaj monda niveloj kaj certigi ke tiuj kompanioj kaj riĉaj homoj pagas sian justan parton. Verduloj malakceptas kondiĉojn kiuj permesas al ok riĉeguloj kontroli riĉaĵojn je nivelo de 50% aŭ pli de la tuta homaro.

### **Edukado**

Ni verduloj rekomendas rajton de ĉiu je bona senpaga edukado. Verduloj subtenas internacian interŝanĝon de junaj homoj kiel grava kontribuo por demokrata kaj internaciisma edukado. Ĉar laborkondiĉoj ŝanĝiĝas oni devas doni eblon por vivlonga lernado.

### **Justaj transiroj**

Ni Verduloj promesas provizi justan transiron por individuoj kaj komunumoj kiuj estas trafitaj de ŝanĝiĝoj de naturo kaj laborofertoj fontantaj el ekologiaj imperativoj, la cifereca revolucio kaj mekanizado.

### **DAŬRIPOVA EVOLUO**

Ni Verduloj volas konstruadi novan ekonomion de kaj por la homoj kiuj protektas ekologiajn sistemojn kaj respektas naturon.

### **Ekonomia transformo**

Ni verduloj aktive antaŭenigas strategiojn de ekonomia transformado en industrio, servoj kaj agrikulturo kiuj kombinas ekonomian sukceson kun imperativoj de daŭripovo laŭ La Celoj por Daŭripova Evoluo de UN. Ĉi tiuj strategioj ankaŭ limigas monopolajn, korporaciajn privilegiojn aŭ kontrolon kaj land-ekskaptadon.

### **Vivi ene de la limoj de la planedo**

Senfina kresko de ekonomio ne eblas. Ni Verduloj permesas kunlabori aktive kaj urĝe por fari turnon al vivado ene de sekura kaj juste uzebla spaco por la homaro sur la Tero.

### **Evoluigi socian renovigon**

La verda kulturo kontraŭas konsumismon. Verduloj subtenas cirkulan ekonomion kie estas facile reuzi, ripari kaj recikli. Ni subtenas ekonomion bazitan sur komuna posedaĵo de kooperativoj kaj similaj institucioj tiel ke la ekonomio utilas por la plimulto.

### **PACO**

Ekologiaj aferoj, sociala justeco, demokratio kaj paco estas ligitaj. Sole kie homoj havas demokratan regadon kaj ĝuas siajn civitajn kaj homajn rajtojn, inkluzive de virinaj rajtoj, estos ŝancoj solvi kontraŭdirojn pace. La homaro devas prepari regulojn je multaj niveloj por ebligi homojn adaptiĝi, lerni kaj ŝanĝiĝi tra tempoj (Elinor Ostrom) por transdoni al estontaj generacioj kion ni heredis.

### **Sen-atomarmila mondo**

Ni verduloj efikas por fini minadon, eksportadon kaj uzon de uranio, k kampanjos por aboli atomarmilojn.

### **Principo de la jurŝtato**

Ni Verduloj laboras por daŭrigi kaj evoluigi multflankan internacian ordonon kun la Unuiĝintaj Nacioj kiel ĝia kerno. Ni kontraŭas en la internaciaj rilatoj la sistemon kie fortuloj agas laŭ sia plaĉo kaj malfortuloj devas agi kiel oni ilin ordonas.

### **La justa komerco**

La justa komerco estas necesa kondiĉo por paca internacia evoluo. Ni Verduloj malakceptas ekspluaton pere de komerco kiu subfosas socion.

### **Malakcepti militarismigon**

Ni Verdulojn malakceptas militarismigon de internaciaj rilatoj. Ni neniam akceptos la uzon de armeaj rimedoj ŝanĝi landlimojn aŭ senigi popolon de ilia libereco.

2017-04-02: [greens2017.org](http://greens2017.org) ; [AVE:verduloj.org](http://AVE:verduloj.org)

**Kongreso de La Monda kaj Eŭropa Verdularo**